Reunia turfalko

La **Reunia turfalko** (*Falco duboisi*) estas formortinta rabobirdo kiu apartenas al la familio de Falkedoj. Ĝi loĝis en la inuslo de la Maskarenoj nome Reunio kaj estis parto de la Okcidenta hindoceana radiado de turfalkoj.

Konataj el la ostoj de subfosilioj kaj skribaĵoj de Sieur Dubois publikitaj en 1674, tiu birdo estis pli granda ol sia parenco *F. punctatus* de Maŭricio, pli malpli granda ol la Komuna turfalko, ĉirkaŭ 35 cm el kapo al vosto, estinte maskloj rimarkinde pli malgrandaj ol inoj. Tiu trajto, ekzista ĉe plej parto de rabobirdoj, estas pli markata ĉe la plej grandaj, birdomanĝantaj specioj kaj malpliiĝas inter ses konkurencon por niĉodiferenco.

Oni supozas, ke tiu birdospecio estis de la sama ĝenerale bruneca koloraro kiel siaj plej proksimaj parencoj, kun pli helaj subaj partoj kaj pli malhelaj punktoj aŭ makuletoj, la vosto, bruna aŭ pli probable griza, kun strioj kaj nigra pinto. Ties piedoj estis flavaj kaj grandaj relative al la birda ĝenerala grando. La enverguro estis de 60-70 cm, ties flugiloj estis pli rondoformaj ol tiuj de la Komuna turfalko – ĝuste kiel ĉe la maŭricia parenco – por pliiĝanta manovreblo dum ĉasado en arbaro. Probable, sed ne certe, la nura diferenco inter seksoj estis ties grando. Tiu birdo manĝis ĉefe birdojn, sed certe ankaŭ insektojn kaj gekojn; Dubois notis, ke spite ties malgrando ili povis predi (supozeble duonkreskajn) hejmajn kokojn.

Reunia turfalko	
Biologia klasado	
Regno:	Animaloj *Animalia*
Filumo:	Ĥorduloj *Chordata*
Klaso:	Birdoj *Aves*
Ordo:	Falkoformaj *Falconiformes*
Familio:	Falkedoj *Falconidae*
Genro:	*Falco*
Specio:	*F. duboisi*
Dunomo	
Falco duboisi (Cowles, 1994)	
Konserva statuso	
Formortinta | Minacata | Malplej zorgiga	
EX | EW | CR | EN | VU | NT | LC	
Konserva statuso: Formortinta	
Aliaj Vikimediaj projektoj	

Formorto

Dubois menciis tri tipojn de rabobirdoj en Reunio komence de la 1670-aj jaroj: laŭ grado de malgrando, *papangues* (la loka cirkuo kiu ankoraŭ ekzistas), *pieds jaunes* ("flavpieduloj") kaj *émerillons* (termino por malgrandaj falkoj kiaj Kolombofalko). Ne klaras kiu nomo aludis al la Reunia turfalko. Laŭ tiu mencio la birdo estis plej probable la *émerillon*, kaj la *pieds jaunes* estus migraj falkoj (la ununuraj specioj kiuj povus loĝi en tiu areo, nome Malhela falko, Kliffalko kaj la Migra falko, estis pli grandaj ol la *F. duboisi*, se ne laŭ ĝenerala longo, almenaŭ laŭ enverguro) aŭ junuloj de la cirkuoj, kiu estas distingkoloraj kaj ankaŭ havas flavajn piedojn. Tiu lasta klarigo ŝajnas pli logika ĉr tiu nomo estis certe aplikataj al junaj cirkuoj fine de la 19a jarcento. Tamen ŝajnas pli malproksime eble ke la seksoj de Reunia turfalko estis ne nur de diferenca grando, sed ankaŭ de diferencaj koloroj. Tiukaze la maskloj estus la *émerillons* kaj la inoj la *pieds jaunes*.

Tio ŝajnas ne verŝajna kiam Feuilley en 1705 mencias nur *papangues* kaj *pieds jaunes* kiel vivantaj. La formorto de la Reunia turfalko, kiu ŝajne finis ĉirkaŭ 1700, estas iom mistera, ĝuste kiel tiu de la Reunia strigo. Enmetitaj predantoj ne estis ankoraŭ en nombroj kaj eĉ ratoj probable ne estis ankoraŭ drasta problemo por tiuj

birdoj. Certe ili estis konsiderataj plago ĉar ili manĝis kortobirdojn, sed ĉasado ŝajne ne povis malpliigi ties populacion multe tiam, kiel pruvas la konstanta survivado de la cirkuoj, kiu estis ege persekutata dum jarcentoj pro la sama tialo.

Referencoj

- Cowles, Graham S. (1994): A new genus, three new species and two new records of extinct Holocene birds from Réunion Island, Indian Ocean. *Geobios* **27**(1): 87–93.

Birdoj

Regno: Animalo • Filumo: Ĥorduloj • Subfilumo: Vertebruloj • Infrafilumo: Makzeluloj • Superklaso: Tetrapodoj • Klaso: Birdoj

Birdoj laŭ ordoj *(alfabete)*

Ordoj de

akcipitroformaj ~ anseroformaj ~ apodoformaj ~ cikonioformaj ~ falkoformaj ~ fenikopteroformaj ~ gavioformaj ~ gruoformaj ~ ĥaradrioformaj ~ kaprimulgoformaj ~ kokoformaj ~ kolomboformaj ~ koracioformaj ~ kukoloformaj ~ paseroformaj ~ pegoformaj ~ pelikanoformaj ~ podicipoformaj ~ procelarioformaj ~ psitakoformaj ~ pteroklоformaj ~ sfeniskoformaj ~ strigoformaj ~ strutoformaj ~ tinamoformaj ~ trogonoformaj ~ trokiloformaj ~ turnicoformaj

Rilataj artikoloj: Birdomigrado ~ Birdoprotektado ~ Birdnestoj ~ Birdkanto

Vidu ankaŭ: Dinosaŭraj birdoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Reunia_turfalko&oldid=5296464"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 04:19, 27 aŭg. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.